

PENSEO

N-ro 241

nov. / 2011

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 22-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinio)



al Tomas Tranströmer,
la nobelpremiito pri literaturo en 2011

hierau nokte kulo oreldiris al mi
ke aŭtune pomo ekrikoltas falon.
morto ne estas rajto ekskluziva de bolidoj.
folioj dediĉas sian sangon
por ke arboj gravediĝu.
budho garantias per sia vortaro:
ŝtonoj simfonion el la vivo kaj la morto
kapablas kompreni pli bone ol homoj.
ĝemado de la inoj kaj plorado de la beboj
estas plezuroj de atomoj.
la fajrego portas vivon al la plantoj.
en dezertoj la skorpionoj
nutras serpentojn venene.
kamelioj retenas ternemon
timante ĝeni la geiĝon de la kulo kaj la luno.
la sparko frosta akvigos la nigron.
jen premio de mortinto al vivanto.



Ŝtonoj

ombroj atendas la arbaron jam perditan.
la tempo naĝas en la akvo.
birdo estas fluganta boato.

niaj kapoj estis formanĝitaj de fiŝaro;
la svatantino restas muta.
verdo el domo fuĝis.
en la fendo kreskas haroj firmaj.
ni atendas
ke la urbo fariĝu kamparo.
tie en la nokto kun la suno
kapoj revenos sur niajn ŝultrojn.
certe anstataŭis ilin planedoj sterilaj.
spite al ŝtalbetono,
la trunkoj prosperas en la ventro
de la fiŝoj fosiliĝintaj.



Josip Pleadin (Kroatio)



DU MORTOJ SUR OKINAVO

Amike bierumis en munkena trinkejo
studento el Tokio kaj ulo el Vaŝington'.
Inter glutoj el kruĉoj ektondris en la ejo
rakonto de l' studento kiel bru' de kanon':

“Mia avo Hikami falis sur Okinavo
dum lasta *banzai** hurle reeĥis en la valo.
La tuta rot' lavangis kun elingitaj glavoj -
Lia brusto striita per dumduma rafalo.”

Preskaŭ morte ebria dentklakis usonano:
 “Falis sur Okinavo ankaŭ mia avo John,
 en japana atako, tranĉita per *katano***,
 por nacia fiero, por honoro de Uson’.”

Ĉetable eksilentis en munkena trinkejo
 la fiera studento kaj juna Vaŝingtonan’.
 Tra rakontoj sensencaj viviĝis en la ejo
 du mortoj okinavaj en kirlo de uragan’.

* *banzai* - japana atakkrio, *hurao*

** *katano* - tradicia japana glavo

Mikaelo Bronsxtejn (Rusio)



Montrante la familian albumon al la gasto-oficiro

Ĉu vin kaptas ia tristo tenera,
 ne, ne amo, – estas io alia,
 kiam montras vi ĉe lampo vespera
 flavajn fotojn en album’ familia?

Min ja jes. Jen mia avo – sen mon’, do
 idojn tamen produktinta kun fajno:
 sep gefiloj liaj venis en mondon!
 ... Ĉiuj sep suferis en militfajro.

La avinjo – jen, grizhara, en lito...
 Jam malsana, jes, okdekjarulino.
 En Taŝkent’ ŝi restis dum la milito
 por priplori kaj atendi. Ĝis fino.

Tiu estas la plej aĝa onklino,
 kiel panjo – belvizaĝa kaj svelta...
 La unuan trovis ŝin la mortfino
 En fornego de l’ horora Oswiecim.

Jen aliaj tri – tre ĉarmaj, endance...
 Dum bombado teren falis, vunditaj.
 Inter ili – mia panjo. Bonŝance
 nur brultuŝis ilin fajroj militaj.

Plej bonŝance ja por mia patrino,
 ĉar hazarde, inter sanga homkaĉo
 la knabinojn trenis for, al ravino,
 brulvundita viro, jen, do – la paĉjo.

Tiu dando? Jes, la onkl’. Ne en banko.
 Li spertiĝis pri labor’ kun juveloj...
 Sed forbrulis batalante, en tanko,
 dum kolegoj zorgis pri siaj feloj.

Honorigon lian por batalardo,
 por glorago, heroaĵo kulmina, -
 la ordenon de la Ruĝa Standardo
 prenis panjo nur en la sesdek kvina.

Jen alia - fortegul’, kiel bovo!
 Forĝis feron li, hufumis ĉevalojn...
 perdis brakon apud fora Harkovo,
 sed ricevis (vidu jen!) du medalojn.

Jen la lasta – prudentulo diketa,
 kolonelo, ĝisirinta Berlinon,
 eksigita pro l’ ordono hebeta
 postmilite. Kaj pafinta la sinon.

Ruĝa sun’ subiras nuben kun vento –
 morgaŭ, eble, ne tre bonos vetero...
 Mi, naskita post kaj dank’ al la Venko,
 kvazaŭ vidis la militon en vero.

Mi malamas ĝin... Ja multaj la saman
 sorton havis, ankaŭ la familion...
 Jes, vi estas militisto, kaj tamen -
 ĉu vi volas ke mi ŝatu militon?



Roseha (Francujo)



Iza

al amikino mia - el Moroko -
Varmega menta teo,
La kukoj parfumitaj
De cinamo,
La koloritaj glasoj,
La pleto el ruĝa kupro,
Ĉio estas memorinda.

Sub ombro de oranĝarboj
Tiel freŝa,
Ni somere trinkis teon
Kun Iza.

Iza havis belecon
De la filinoj de suno.
Hararo ŝia balzamis
Jasmenon.

Ni estis senzorgaj
Junulinoj tiutempe.
Senfine ni babilis
Pri niaj aminduloj...

Kiam ĝoje ni rakontis
Pri iliaj mallertaĵoj,
Elŝprucis kiel Kaskado
Neretenabla ridado
De Iza !

Tiam ĉiuj ridis kune
Ĝis kiam ni ne plu povis
Spiri !

Antaŭlonge tiu okasis....
Nostalgie mi memoras
Pri miaj amikinoj,
Oranĝarboj tiel freŝaj
Somere sub la Maroka
Ĉielo...

Neniam tiun ridadon
De Iza mi forgesos !



Cezar (Germanujo)



Kia kiĉo!

Strangulo sata pri la viv',
pri ĉiu vanto kaj lasciv',
decidis fini tiun dramon,
sed jen li trafis fortan damon.

Ŝi tiun de la ag' detenas,
unue monon lian prenas.
Li mortu nur je l' sekva tag',
kvankam la vivo estas plag'.

"Mi sekvos vin al la ĉielo",
ŝi flutis kun tre klara celo.
Li sin mortigis pro feliĉo.
Ŝi diris nur: "Ha, kia kiĉo!"

Nazaré Laroca (Brazilo)



Floroj

Se vi volas spiri
L' odoron de Di',
Se la Di-koloron
Volas vidi vi,

Rigardu la florojn!
Eroj de l' Di-kor,
Ili poem'lumas,
La mondon parfumas,

Kiel am-trezor'! ...



Paŭlo Silas (Brazilo)



MONDAJ MALKAŜOJ

Mi sentas tremon sub miaj piedoj,
Pro kiu ĉesos la senmova kvieto.
Ekstremaj fortoj ekvibras en la mondlimoj!
Susur' severa defluas de la Tera sino...

Surgrimpu ŝtupojn de l' montoj! — Mi pensas
sursojle:

Mi aŭdis paŝon silentan survoje...
Ĉu l' lasta estis ĝi? — Ĉu estis l' unua?
Aŭ simple sentis mi falsan impreson bruan?

Mireg' en l' okulojn! — Jen ekas malbonaj
malkaŝoj:
La firmaj bazoj malhavis pluan konvinkon!
Ŝanĝiĝ' okazis kaj kaŭzis la timon,
Ke, super ĉio, ekestiĝos novaĵoj.

Jen ostoj de mortuloj el kavaj tomboj
Kaj korpoj de dronintoj el maraj ondoj!
Jen voĉoj de fantomoj el bravaj tondroj
Kaj bildoj teruregaj el lastaj sonĝoj!

Jen vivo foriranta el multaj mondanoj:
La akvoj nigraruĝaj el ŝtonaj fontanoj.
Jen veroj alligitaj al pezega ankro:
Homaro sin dronigis en la propra sango.



KRESKADO SEN FINO

4,5 mil milionoj: 4 kaj duono...

Altmaraj akvoj silentiĝu en la golfo,
L' unua vorto rerenkontu sian sonon
Kaj vivofluo renversiĝu en la ovon.

Vekiĝ' aliru pli profunde al la sonĝo,
Ĉar suno sin senkolorigas, malefikas.
7-miliarda kapovic' en tiu ĉi domo
Al la kolonoj malfirmecon plu ekigas.

Blazio VAHA (Hungarujo)



Salso kaj pulso


Kiam oni dancas salson,
ne kontrolas sian pulson -
jen erar'...

Tamen bonaj kuracistoj
atentigas, ho dancistoj,
iĝu nun - korpogardistoj!

Aŭ horar'
via marku la minutojn
kiam salsu vi sekundojn,
sen danĝero de katar',
poste vi prefere naĝu,
kaj infanojn instruadu,
tre atendas vin taskar'

—tristigonta, ĝojigonta

Leieladonna (Meksiko)



Duba kaj konkludiga

La foresto estas kiel la distanco...
la tempo estos kiu determinos
se du animoj kunigas sin aŭ apartigas sin
perturbi sian amon aŭ disolvu ĝin
en la malpleno el la tempo kaj la spaco.

Kaj okazas du aĵojn diferencajn
 memoroj kaj forgesoj senkompataj
 amantoj klamas aŭ strangoj silentaj
 memoroj flamiĝemaj aŭ abomenataj
 por tiuj kuraĝaj aŭ falsaj.
 La suno instigas iujn kaj nuligas aliulojn
 por renovigi votojn aŭ subteni rutinojn
 en dolĉaj printempoj aŭ vintroj frostaj
 kiam la suno ekscitas sin aŭ malpliigas sin
 Estas la kutimo, kelkaj fojoj la rutino
 la timo aŭ la valoro al la riproĉo
 kaŭze de singardo, prudento, kara kaj
 senhonto

ĉar el ĉio, nenio, kaj egala
 vi iras ĉe nenio, ĉio, kaj diferenca
 se estas la kazo esti kuraĝa.
 Kaj dum la tagoj paŝas...
 noktoj fridaj kaj brulantaj,
 aŭroroj tepidaj kaj sekaj,
 kusenoj kaj littukoj agresaj.
 Kaj jam malfrua la tago sidigas vin
 via menso kuras vigla, vi ripozas
 karesante sonĝojn kaj memorojn
 pigreme en forlasiteco
 en iu angulo, via preferata...sola.

Marcus Vinícius

Fidelsoneto

Al mia am', unue, nepr-atentos
 kun vera zorgo mi, ĉiam, kaj multe,
 ke eĉ antaŭ la plejbono, ekzulte,
 ĝin mia pens', pli, kiom sin identos.

Ĝin mi tuthorvivos, kaj elokventos
 ĝis verse ĝin diskanti kvazaŭkulte,
 liberridos mi, mi ploros singulte
 laŭdece se ĝi tristos aŭ kontentos.

Tiel, kiam posttempe min postvenos
 nu mort', angor' ja de ĉiu vivanto,
 aŭ sol', finfine fin' de ĉiu amo,

Al vi mi povu diri (kun galanto!)
 ke spite al nesenmortec', ĉar flamo,
 am' tamen sen lim' estu ĝis forsvenos.

**Marcus Vinícius da Cruz e Mello Moraes,
 Rio-de-Janeiro (RJ) okt 19-an 1913 — jul
 9-an 1980. Brazila diplomato, poeto, teatra
 verkisto, elstara komponisto de nacia
 kanzonaro.*

esperantigis



Ŭel (Brazilo)

Trilussa (1873-1950)

La fino de la filozofo

Apenaŭ eniris en virgan arbaron
 la profesoro de filozofio,
 ĉiuj simioj descendis el arboj
 kun intenco forpeli lin el tie.

Sed la hom' diris: Nu, kion mi faru,
 resti filozofo ne havas sencon
 en ĉi socio plena da kaptiloj,
 kie la agado trompas la menson.

Hodiaŭ, valoraj estas nur muskoloj :
 La racio gajnigas eĉ ne groŝon...
 Pli bonas la simioj ! –
 Kaj povra filozofo
 Surgrimpis la palmon de kokosoj.

esperantigis



**Helena Ty Lipska
 (Italujo)**



Sandor Petoöfi (1823-1849)

Vi Amas Printempon

Vi amas printempon sincere,
kaj mi amas aŭtunon pie.
Aŭtun' similas al mi vere,
printempo al vi tamen plie.

Sur viaj ruĝaj vangoj pacaj
estas printempa roz-gracilo.
Dum miaj rigardoj tre lacaj
palas en aŭtuna sunbrilo.

Se mi antaŭen paŝon faras,
kun ankoraŭ plia paŝdono,
tiam mi ĉe la pordo staras
de malvarma vintra sezono.

Se mi je paŝ' retro-moviĝas,
kaj vi antaŭen je paŝero;
Ah, tiam ni ambaŭ troviĝas
en bela kaj varma somero.

esp-igis



Eĉino (Ĉinio)

2011-10-10

Jules SUPERVIELLE

Vi afablu al poeto!

Vi afablu al poeto!
Ĉar li estas milda besto,
koron, cerbon al ni pruntas,
Niajn plagojn li proprigas,
Igas sin nia ĝemelo.
En dezertoj de l'a-vortoj
Iras li antaŭ profetoj
Sur sia sufer-kamelo.
Li honestul' vizitadas

Mizeron kaj por ni bonas
Oferante, bona bruto,
Sian korpon al vulturo;
Kondukas al klarverkaĵojn
Niajn palajn eksvagaĵojn
Al li donu festdonacon :
Interpretistan kaskedon !

elfrancigis



**Roland Platteau
(Francujo)**



Ĉineske

Stafetado de ĉinesko Litingyan*

Vejdo (Ĉinio)



Funebre pri mia kuzino

fulme malaperis
mia kara kuzin'
forportite de kancer'
laŭ malbona destin'
spite al via
barakto de obstin'

via serena rid'
vere kortuŝas min
plue en ontaj tagoj
nek rev' nek halucin'
ni vivas kune
certe daŭre sen fin'



Cindy Mckee (Usono)



Vi montras familion

Trankvilaj esprimoj:
al morto, scia klin',
al vivo vi rektiĝas.
Ŝi vivas en la sin',
en la sin' de vi,
familio sen fin'.

Kurbiĝoj de fingroj
ekde la origin'.
Miloj da mildaj fingroj
super la granda sin'.
Portita en vi,
familio sen fin'.

Vejdo (Ĉinio)

Gravas vivi

ha, vi vere pravas
sur la morta ruin'
vivantoj devas vivi
kun persista obstin'
ŝi jam troviĝas
profunde en la sin'

lerni kaj labori
estas viviga vin'
ni ja daŭre klopodu
al celo ĝis viv-fin'
se vivante plu
ni agu kun sangvin'

Cindy Mckee (Usono)

La vivo nun

Pri la nuna tago
estu sana fascin'.

La celo kaj memoro
estu niaj destin'
kaj muldilo de
nia fina difin'.

Nuna suno estas
la nura ilumin'.
Nia vivo estas nun.
Pli simple ol doktrin':
en nia nuno
estas neniu fin'.

Vejdo (Ĉinio)

Vivo belas

nuna vivo belas
pro alloga fascin':
fervora amuziĝo
al komforto inklin'
ĝua manĝado
flirtado kun fraŭlin'

sed plej gravas tio:
ĉasadi kun obstin'
la deziratan celon
strebi sen halucin'
agi reale
fari paŝojn sen fin'

**Litingyan (hirundo ĉe kiosko): ĉina fiksfirma
poemo el du strofoj kun po 6 versoj de 66, 76,
56 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa
(x=senrima)*

Tri pecoj de ĉinesko Tiaoxiaoling*

Guozhu (Ĉinio)

Al Vejda

(2011-10-22)

Vejda, Vejda,
sub la stelo verda.
Gratula ĝojveko,

feliĉa substreko.
Kore, kore,
naskiĝtag-memore!

Vejdo (Ĉinio)

Dankon

al vi, al vi
dankon kun mia pi'
pro via omaĝo
al la viv-vojaĝo
ĝoja, ĝoja
kun klopod' survoja.

Cindy Mckee (Usono)

Transkultura aganto

Kara, kara
Vejdo temerara,
agas verdefide
edife, edife
ĉinaĵoj specife.

**Tiaoxiaoling (flirta kanto): ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.*

Vejdo (Ĉinio)

Memporetro

okaze de mia naskiĝtago 2011

—laŭ ĉineska skemo Manjianghong*

kun fervoro
arda kaj
multa peno
kultivas
mi kampule

sur tereno
esperantuja verda
asidue sen ĝeno
nek pento
por rikolto kun
ŝvit-pleno

humora
sereno
kaj gaja
mieno
bone sanigas
min sen spleno
mi verkas diligente
kun ĉineska kompreno
por paŝi
al la parnasa
festeno

**Manjianghong (rivero plenruĝa): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xxa, xxa, xa, xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x = senrima)*



Eĉino (Ĉinio)

Jubileo Berila/ Sub Verda Stelo Brila

—laŭ ĉinesko Shuidiaogetou*

(2011-10-22)

Ora aŭtuno./ Vento facila.
Flirtas verda flago/ kun stelo brila.
Venas jubileo/ de esperantistec'/ ĉarme berila.
Por nia kara/ Eĉin' humila.

okazas/ kunsido/ babila/
en etoso/ familie simila.

Laŭdas la vers-paro/ kvindek-kvin-silaba/ tipe ĉin-stila./

EES kronas/ per kant' jubila.



**Shuidiaogetou* (preludo de akva melodio): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj laŭ rimaranĝo de *xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa* (*x = senrima*)

Maupassant (1850-1893)



FRAŬLINO FIFI

(I)

La majoro, prusa komandanto, grafo de *Farlsberg*, elfinis legi siajn poŝtaĵojn, kun la dorso funde de granda brakseĝo el tegaĵo, kaj liaj botvestitaj piedoj sur la eleganta marmoro de la kameno, kie liaj spronoj, jam de tri monatoj li okupis la kastelon de Urbuo, fosis du profundajn truojn, kiujn ĉiutage li iom pliprofundigis.

Kafotaso fumis sur unupieda tableto el lignomozaiko makulita per la likvoroj, brulvundita per la cigaroj, entranĉita per la tranĉileto de la konkeranta oficiro, kiu iafoje, ĉesante pintigi kraĵonon, strekis sur la beleta meblo ciferojn aŭ desegnojn, laŭ la fantazio de lia kaprica revo.

Kiam li finlegis siajn leterojn kaj preterlegis la germanajn ĵurnalojn, kiujn lia militista leterportisto ĵus alportis al li, la

oficiro stariĝis, kaj ĵetinte en la kamenon tri aŭ kvar pecegojn el verda ligno, ĉar tiuj sinjoroj hakfalis, iom post iom, la arbojn de la parko por varmiĝi, li alproksimiĝis al la fenestro.

Abunde pluvis, normanda pluvo, kiun oni dirus ĵetita per furioza mano, oblikva pluvo, densa kiel kurteno, kiu formis specon de muro kun oblikvaj strioj, morda pluvo, surŝpruciganta, kiu dronis ĉion, vera pluvo de la ĉirkaŭaĵoj de Rueno, la plej grava pluvejo de Francio.

La oficiro longe rigardis la inunditajn herbobedojn, kaj tien for, la ŝvelitan rivereton Andelle kiu superbordiĝis ; kaj li tamburinis kontraŭ la vitro Rejnan valson, kiam bruo turnigis lin : estis lia adjunkto, la barono de Kelveingstein, kies rango samvaloris kiel kapitano.

La majoro estis giganta, kun larĝaj ŝultroj, longa barbo ventumilforme, kiu formis tavolon, ornamis lian bruston ; kaj lia tuta solena granda persono estigis la ideon de milita pavo, pavo kiu surhavis sian malfalditan voston ĉe sia mentono. Li havis blujajn, malvarmajn kaj mildajn okulojn, unu vangon fenditan per sabrofrapo dum la Aŭstria milito ; kaj oni diris lin, tiel brava homo kiel brava oficiro.

La kapitano, malgranda ruĝvizaĝulo kun dika ventro, forte streĉpremita en sia uniformo, havis densan vanghararon preskaŭ razitan, kies fajraj haroj kredigus, kiam ili troviĝis sub certaj rebriloj, ke lia vizaĝo estus frotita per fosforo. Du perditaj dentoj dum diboĉa nokto, kies li ne memoris ekzakte kiamaniere, kraĉigis al li nebulajn parolojn, kiujn oni ne aŭdis ĉiam ; kaj la supro de lia kranio nur estis kalva, tonsurita kiel monaĥo, kun harbando el malgrandaj, frizaj, orkoloraj kaj brilaj haroj, ĉirkaŭ tiu rondo de nuda karno.

La majoro manpremis lin, kaj trinkis per unu gluto sian kaftason (la sesan de post la mateno), aŭskultante la raporton de sia subulo pri la okazintaj incidentoj en la servo ; poste

ambaŭ alproksimiĝis al la fenestro deklarante, ke ne estis gaje. La majoro, edziĝanta kaj trankvila viro, akomodigis al ĉio ; sed la kapitano-barono, ĝisosta diboĉulo, kutimanta de la drinkejaĉoj, furioza jupĉasisto, koleris pro esti enfermata, jam de tri monatoj, en la deviga ĉasteco de tiu izolata posteno.

Ĉar oni gratis ĉe la pordo, la majoro kriis ke oni malfermu, kaj ulo, unu el iliaj aŭtomato-soldatoj, aperis en la aperturon, komprenigante nur per sia ĉeesto, ke la meztagmanĝo estis preta.

En la manĝejo ili retrovis la tri oficirojn de malpli alta rango : unu leŭtenanto Oto de *Grossling* ; du sub-leŭtenantoj, Frederiko *Scheunabourg* kaj la markizo Vilhelmo de *Erik*, iu tute malgranda blondharulo, fiera kaj brutala kun la soldatoj, malmolkora rilate al la venkitoj, kaj violenta kiel pafarmilo.

De post lia enveno Francion, liaj kamaradoj nomis lin nur F-ino Fifi. Tiu kromnomo devenis el lia koketa aspekto, lia maldika talio, kiun oni dirus subtenita per korseto, lia pala vizaĝo kie lia barblano apenaŭ aperis, kaj ankaŭ pro la kutimo, kiun li prenis, por esprimi sian suverenan malestimon rilate al la uloj kaj la aĵoj, ĉiumomente uzi la francan dirmanieron – fi, fi al vi, kiun li prononcis kun leĝera siblado.

La manĝejo de la kastelo de Urbuo estis longa kaj reĝa ĉambro, kies glacoj el malnova kristalo, stelitaj per kugloj, kaj altaj Flandraj murtapiŝoj, fuŝtranĉitaj per sabrofrapoj, kaj pendantaj kelkloke, elmontris la okupojn de F-ino Fifi dum liaj nenifarahoroj.

Sur la muroj, estis tri familiaj portretoj : militisto vestita per fero, kardinalo kaj prezidento, kiuj fumis longajn pipojn el porcelano, dum en ŝia maloriĝinta kadro pro la jaroj, nobela sinjorino kun la brusto kunpremita, arogante vidigis kolosajn lipharojn faritajn per karbo.

Kaj la meztagmanĝo de la oficiroj fluis preskaŭ silente en tiu stumpigita ĉambro,

mallumiĝanta pro la pluvo, malgajiga pro ĝia venkita aspekto, kaj kies maljuna pargeto el kverko fariĝis malpurega kiel planko de drinkejo.

Je la tabakohoro, kiam ili komencis trinki, finiĝinte manĝi, kiel ĉiutage ili ekparolis pri sia enuo. La boteloj da konjako kaj likvoroj pasis de iu al alia ; kaj ĉiuj, dorsfalintaj sur siaj seĝoj, trinkis per malgrandaj ripetataj glutoj, konservante ĉe la lipkomisuro la longan kurban tubon, kiun finis la ovo el fajenco, ĉiam kolorŝmirita kiel por logi Hotentotojn. Tuj kiam ilia glaso estis malplena, ili plenigis ĝin per gesto de rezignacianta laceco. Sed ĉiumomente F-ino Fifi rompis la sian, kaj senprokraste soldato prezentis al li alian.

Nebulo de akra fumo dronigis ilin, kaj ili ŝajnis enprofundiĝi en malgajan kaj maldiligentan ebriecon, en tiun mornan ebriiĝadon de uloj, kiuj nenion havas por fari.

Sed, subite, la barono restariĝis. Ribelo skuis lin ; li sakris : « Pro Dio, tio ne povas daŭrigi, fine necesas inventi ion. »

Kune la leŭtenanto Oto kaj la sub-leŭtenanto Frederiko, du Germanoj eminente naturdotitaj de germanaj fizionomioj, pezaj kaj gravaj, respondis :

« Kion, mia kapitano ? »

Li pripensis dum momenteto, kaj reparolis : « Kion ? Nu, necesas aranĝi feston, kompreneble se la majoro konsentas pri tio. »

La majoro malprenis sian pipon : « Kian feston, kapitano ? »

La barono alproksimiĝis : « Mi zorgis pri ĉio, mia komandanto. Mi sendos al Rueno La Devon, kiu alkondukos al ni sinjorinojn ; mi scias kie trovi ilin. Ĉi tie, oni pretigos vespermanĝon ; cetere nenio mankas, kaj almenaŭ ni pasigos agrablan vesperon. »

La grafo de *Farlsberg* ridetante ŝultrolevis : « Vi frenezas, mia amiko. »

Sed ĉiuj oficiroj stariĝis, ĉirkaŭis sian ĉefon, petegis lin :

– « Ne kontraŭstaru la kapitanon, mia komandanto, ĉi tie estas tiom malgaje. »

Fine, la majoro cedis : « Ja ! » li diris ; kaj tuj la barono alvokigis La Devon. Li estis maljuna suboficiro, kiun neniam oni vidis ridi, sed kiu fanatike plenumis ĉiujn ordonojn de siaj ĉefoj, kiaj ajn tiuj ĉi estu.

Staranta, kun la vizaĝo senpasia, li ricevis la baronajn instrukciojn ; poste li eliris ; kaj kvin minutoj pli poste, granda veturilo de la milita trajno, kovrita per muelista ŝirmtukego volbe starigita, galope forkuris, tirata per kvar ĉevaloj, sub la persistega pluvo.

Tuj tremeto de revigliĝo ŝajnis trapasis la mensojn ; la maldiligentaj pozoj restariĝis, la vizaĝoj animiĝis, kaj oni ekbabilis.

Kvankam la pluvego daŭrigis ĉiam same furioze, la majoro asertis, ke jam taglumiĝis ; kaj la leŭtenanto Oto konvinke anoncis, ke la ĉielo tuj heliĝos. F-ino Fifi mem ekscitiĝis, li senĉese moviĝis, leviĝis, residiĝis. Lia hela kaj malmilda okulo serĉis ion por rompi. Subite, fikse rigardante la sinjorinon kun lipharoj, la juna blondulo elingigis sian revolveron. « Vi ne vidos tion », li diris ; kaj ne forlasante sian sidilon, li celumis. Du kugloj sinsekve krevis la du okulojn de la portreto. Poste li ekkriis : « Ni faru la minon ! » Kaj tuj la konversacioj interrompiĝis, kiel se nova kaj potenca intereso ekkaptis ĉiujn.

La mino estis lia invento, lia maniero por detruĝi, lia preferata amuzaĵo.

Forlasinte sian kastelon, la laŭleĝa proprietulo, la grafo Ferdinando Amuo de Urbuo, ne havis tempon por ion kunporti, kaj ion kaŝi, krom la arĝentaĵaro, kiu estis enfosita en truo de muro. Nu, ĉar li estis tre riĉa kaj grandioza, lia granda salono, kies pordo rigardis al la manĝoĉambro, elmontris antaŭ la hasta fuĝo de la hejlestro, la aspekton de muzea galerio.

Sur la muregoj pendis altaprezaj pentraĵoj, desegnaĵoj kaj akvareloj, dum sur la mebloj, la bretoj, kaj en la elegantaj montraĵoj vitroŝrankoj,

mil bagatelaĵoj, porcelanvazoj, statuetoj, figuretoj el Saksio kaj statuetoj el Ĉinio, malnovaj eburobjektoj kaj vitroj el Venecio, garnis la vastan salonegon de ilia stranga kaj multvalora amaso.

Restis malmulte da ili nun. Ne, ĉar oni rabis ilin, la majoro grafo de *Farlsberg* tute ne permesus tion ; sed F-ino Fifi, de tempo al tempo, faris la minon ; kaj ĉiuj oficiroj, ĉitage, vere amuziĝis dum kvin minutoj.

La malgranda markizo iris en la salonegon serĉi tion, kio necesis al li. Li realportis unu tute beletan tekruĉon el Ĉinio de la familio Rozo, kiun li plenigis per pulvo, kaj per la elfluilo, li delikate penetrigis longan tindropecon, ekbruligis ĝin, kaj kuris reporti tiun eksplodsystemon en la najbaran ĉambregon.

Poste li rapidege revenis, kaj fermis la pordon. Ĉiuj Germanoj atendis, starantaj, kun ridetanta vizaĝo de infana scivolo ; kaj, tuj post kiam la eksplodo skuis la kastelon, ili sin pelis kune.

F-ino Fifi eniris la unua, delire aplaŭdis antaŭ Venero el bakita argilo kies kapo fine eksaltis ; kaj ĉiu plukis porcelanajn fragmentojn, miris pro la strangaj dentadoj de la splitoj, ekzamenis la novajn damaĝojn, kontestis iujn detruojn kiel faritajn per la antaŭa eksplodo ; kaj kun patra mieno la majoro rigardis la vastan salonon malordigitan per tiu Nerona mitralado, kaj sabloŝutitan de disrompitaĵoj el artobjektoj. Li eliris la unua, deklarante senafektece : « Ĉifoje, tio bone sukcesis. »

Sed tia fumotrombo eniris en la manĝoĉambro, mikante al la tabakofumo, ke oni ne plu povis spiri. La komandanto malfermis la fenestron, kaj ĉiuj oficiroj, reveninte por trinki lastan konjakoglason, alproksimiĝis al ĝi.

La malseka aero enŝoviĝis en la ĉambro, alportante specon da akvopolvo kiu pudris la barbojn, kaj inundan odoron. Ili rigardis la

